

# Vojaĝe kun ISAE

*Josef* KAVKA

## 1. Landa delegito

Mia unua renkontiĝo kun ISAE okazis en 1961, kiam la ĝenerala sekretario *Prof. D-ro B. Popović* sendis al mi Bultenon de ISAE (n-ro 1 de 15.4.1961). Ĝi enhavas liston de la landaj delegitoj: por Ĉeĥoslovakio: *PhA. Mr. J. Hanuš*. Ĝuste tiu ĉi landa delegito estis disponiginta al la ĝenerala sekretario mian adreson. Baldaŭ poste (1962) li proponis al prof. *Popović*, ke mi transprenu la stafeton landdelegitan. Pli da detaloj ilustrantaj la tiaman situacion en ISAE troviĝas en mia vivjubilea artikolo omaĝe al la mondfama astronomo kaj grava ISAE-funkciulo *Popović*. (Scienca Revuo, 1983, 67-85).

Ne estis facile, dum la komunisma regado en Ĉeĥoslovakio, efike disvolvi la landdelegitan agendon de internacinivela asocio. Ĉion tiaspecan tiamaj instancoj rigardis tre suspekteme. Oni rezolute batalis kontraŭ "kosmopolitismo". Tamen mi baldaŭ sukcesis kolekti multajn interesatojn, eĉ abonantojn de Scienca Revuo, kvankam daŭris enormaj obstakloj por transpago al Jugoslavio, kiun oni paradokse konsideris kiel landon "kapitalisman". Nur ekde 1964 mi povis abonigi – pere de la ĉeĥoslovaka Poŝta Gazet-importa Servo – la revuon kaj la bultenon por nialandaj ISAE-adeptoj. Ke tiu ĉi financa kontribuo al ISAE ne estis neglektebla, tio evidentiĝas el la ekonomia raporto pri 1964: Inter la enspezoj de ISAE staras Ĉeĥoslovakio unualoke (per 2786 steloj), sekvas Sovetio (1985 steloj), Federacia Germanio (1846 steloj) kaj Francio (1706 steloj). Skribante tiujn ĉi liniojn, mi haltas enpensa super la listo de la ĉeĥoslovakaj ISAE-membroj fine de 1966.



Estas inter ili diversfakuloj. Laŭalfabete la n-ro 1: *Ambrož Josef*, oficisto en la sociala fako, la lasta n-ro 153: *Zvara Milan*, Inĝ. bioĥemiisto (bedaŭre forpasinta en 2003).

## 2. Geologia Sekcio

En 1965 mi proponis fondi Geologian Sekcion de ISAE (GS-ISAE). La estraro de ISAE rajtigis min per sia dokumento (de 5.6.1965) funkcii kiel provizora organizanto de la sekcio. La unuaj mencioj pri tio troviĝas en Bulteno de ISAE (n-ro 15 de 20.9.1966 p. 3, 6). Tuj dekomence aliĝis geologoj-esperantistoj el Ĉeĥoslovakio, Sovetio, Brazilo, Hungario, Japanio, Pollando, Germanio kaj Rumanio. Inter ili estis mondrenomaj eminentuloj (detalojn oni vidu en AEST, 1990, p. 127-135, *Poprad*, represita en Akademiaj Studoj, 1988-1990, p. 91-99, *Esperanto-Press, Bailieboro*; pri akademiano *S.V. Obruĉev* kaj prof. *D.L. Armand* vidu en Geologio Internacia, 1968).

La sekcio zorge sin preparis por Internacia Geologia Kongreso (IGK) en Prago (1968). Unue ĝi lanĉis vastan subskrib-kampanjon, ke Esperanto fariĝu unu el la oficialaj lingvoj de IGK. La kampanjo sukcesis – ĝis 1968 – kolekti **pli ol mil** subskribojn de geologoj multalandaj. Al Organiza Komitato de IGK mi transdonis la koncernan peticion jam aŭtune (15.10.1967). Ĝi estas aperinta en la oficialaj kongres-dokumentoj. Tre bedaŭre: la komitata traktado pri Esperanto ne povis plenumiĝi, ĉar la kongreson abrupte likvidis la septembra invado de Varsovia Pakto.

Post kvar jaroj en Montrealo, la cirkonstancoj ne estis tiom favoraj kiom en Prago, kie komencis renkontiĝi multlingva kongresanaro. Ĝi nur povis ekvidi la ĵus aperintan unuan volumon de Geologio Internacia, eldonita fare de la ĉeĥoslovaka entrepreno *Geoindustria*. En Montrealo (1972), plede por Esperanto efike intervenis ĉe IGK prof. *A. Cailleux*, la direktoro de *Centre d'Études Nordiques*. Sed tiea IGK praktikis anglan-francan dulingvecon, do restis surda al ĉiuj klopodoj oficialigi Esperanton. Denove almenaŭ bone, ke la kongresanoj povis konatiĝi kun la dua volumo de Geologio Internacia (GI). Duafoje mi haltas enpensa, ĉi-okaze super la membrolisto de GS-ISAE, laŭ la stato fine de 1973: la n-ro 1 estas prof. *Ph.D. J.W. Ambrose*, *Ducens University, Kingston*,

Ontario, Kanado; la lasta n-ro 88 estas *RNDr. Vlastislav Zázvorka, CSc.*, direktoro de Nacia Muzeo en Prago. Mi menciu ankaŭ iliajn fakojn: struktur-geologio de n-ro 1, paleontologio-biostratigrafio de n-ro 88.

La du IGK-malsukcesoj ne alportis stagnon de plua sekcia aktivado. Sekvis la GI-eldonoj fare de diverslandaj institucioj. En 1974 GS-ISAE sukcesis organizi varsovian simpozion "Internacia Lingvo kaj Geologio" (ILG) sub aŭspicioj de *Instytut Geologiczny*. La Bulteno de ISAE n-ro 37 de 30.12.1973 detale raportas pri tiu ĉi senprecedenca okazaĵo. Mi menciu nur, ke la honora prezidanto estis prof. *Roman Osika*, la direktoro de *Instytut Geologiczny*; en la organiza komitato membris eminentaj geologoj polaj kaj alilandaj. La du tre interesajn ekskursojn gvidis doc. *Dr. Sylvester Skompski*, kiu post mi transprenis la funkcion de GS-ISAE-sekretario. La simpoziaj prelegoj aperis en la tria GI-volumo (1976) eldonita fare de *Instytut Geologiczny*, kiu bonvolis eldoni ankaŭ la GI-volumon kvaran (1982). La kvinan oni eldonis en Budapeŝto (1984). En 1987, omaĝe al la centjariĝo de Esperanto, aperis eĉ du volumoj: la sesa en Taĝikio, la sepa en Brazilo. La okan eldonis Ĉinio (1990), la naŭan Germanio (2001). La grandan paŭzon kaŭzis Usono, kiu eĉ pagis la kompostadon, sed ne sukcesis trovi eldonejon.

La naŭ volumoj de Geologio Internacia (GI-1 ĝis GI-9) nombras sume 1352 paĝojn kun 116 originalaj verkoj de 60 aŭtoroj diverslandaj. En GI-3 mi provis kompili – sendube nekompletan – liston de 130 ĝis tiam aperintaj geologiaj verkoj en Esperanto. Nun, post pli ol la pasinta kvaronjarcento, la statistiko fariĝus multe pli impona. Danke al la riĉa originala literaturo en Esperanto povis kreiĝi geologiaj publikigaĵoj vortaraj kaj popularsciencaj, kies listigo transpaŝus la kadron de mia "memuareto"...

### 3. Ĝenerala sekretario

En 1971 forpasis la ISAE-prezidanto, prof. *Y. Väisälä*. Jarfine okazis elektoj de nova estraro. La Bulteno de ISAE, n-ro 33 de 15.04.1972 anoncas, ke prezidanto fariĝis prof. d-ro *B. Popović*, ĝenerala sekretario d-ro *J. Kavka*. Nature, tuj inundis min neimagebla kvanto da korespondaĵoj el la tuta mondo. Ioman indulgon mi



trovis en tiu fakto, ke la nova prezidanto konservis por si la redaktadon de Scienca Revuo kaj de Bulteno.

Bedaŭre, en 1974 forpasis la gvidanto de Terminologia Centro (TC), Inĝ. *Auguste Broise*. Antaŭ la ĝenerala sekretario elstaris urĝa tasko, baldaŭ trovi novan kompetentulon por la posteno. Mi entreprenis viglan korespondadon kun Inĝ. *R. Haferkorn*, la gvidinton de TC antaŭ *Broise*, kun prof. *G. Waringhien*, kiu tiam prezidis Akademion de Esperanto (ja TC estis laŭstatute ĝia institucio komuna kun ISAE = TC-ISAE), kun ĉiuj ISAE-estraranoj plus aliaj eminentuloj. Temis pri traktado vere temporaba, sur kies bazo fine mi elektis s-ron *Eichholz*. Tiun mi bone konis ekde 1964 kiel kunlaboranto super lia Bildvortaro. *Waringhien* promesis rekomendi lian alelekton por membro de Akademio, kondiĉe, ke *Eichholz* estos elektita por la TC-posteno fare de la ISAE-estraro.

Ĉio havis glatan finon: *Eichholz* fariĝis direktoro de TC-ISAE kaj samtempe direktoro de "Sekcio pri Fakaj Vortaroj" en Akademio de Esperanto. Nu, dum la sekvaj pli ol dudek jaroj enorme dikiĝis mia "ejĥholca dosiero"...

### 4. Redaktoro de Scienca Revuo

Montriĝis, ke atendas min malfacilaj ISAE-jaroj. En julio 1977 prof. *Popović* komunikis al ĉiuj estraranoj sian firman decidon, retiriĝi el la funkcioj prezidanto de ISAE kaj redaktoro de Scienca Revuo. La lasta Bulteno el Jugoslavio, n-ro 48 de 25.4.1978 enhavas mian reagon al la nova situacio. Kun d-ro *Zázvorka* mi organizis elekton de nova estraro. Prezidanto fariĝis prof. *S. Kawamura*. Surbaze de estrar-decido, la ĝenerala sekretario fariĝis ĉefredaktoro de Scienca Revuo. Ja helpos lin redaktoroj de unuopaj kajeroj ... ĉu vere?

La unua trovo de la kompostejo kaj presejo ne estis bonŝanca. La brazilanoj produktis fuŝformatan volumon 29 (1978). Tiom pli sincere sonis en ĝia unua kajero la ĉefredaktora danko al prof. *Popović*, kiu ofereme vivtenis la revuon dum 16 jaroj, krome funkciante kiel ĝenerala sekretario, pli poste kiel prezidanto. Ĉi-loke mi ne kaŝu, ke pluraj ISAE-prezidantoj funkciis pli orname ol laboreme...

Mia dua provo, la italia, liveris la revuon vere belaspekta. Tamen, grava manko montriĝis oftaj malfruoj tiekulpaj. Koncerne la enhavon, mi emis redakti kajerojn ne "mikspotajn", sed iom unufakajn: ekz. en 1978 aperis la kajeroj teĥnika, esperantologia, korp-eduka; en 1979 teĥnika, sociscienca; en 1982 esperantologia, teĥnika, botanika; en 1983 matematika, biografia, ĥemia; en 1984 sociscienca, teĥnika; en 1985 esperantologia, astronomia. Bonŝance, ekde 1982 mi sukcesis transdoni la ĝeneral-sekretarian stafeton al Inĝ. *C. Darbellay*.

Ekde 1988 venis tute neatendita, senaverta okazaĵo: mi ĉesis funkcii kiel redaktanto de Scienca Revuo. Abrupte, eĉ kontraŭstatute, iu el la novaj estraranoj senigis min de la funkcio. Post la kvaronjarcenta funkciula kunvojaĝado, mi ne plu estas engaĝita de la sendanka ISAE! Tamen, la iom amaran emocion baldaŭ venkis sento de nove akirita libereco: ja mia profesia petrologio dum longaj jardekoj riproĉe strabis, ke mi preferas alikampe sulkojn fosadi. Nun mi povis pli kviete dediĉi min al mia "infano" Geologio Internacia kaj reveni al ceteraj utilaj agendoj: Mi finverkis esence novan petroĥemian koncepton per la t.n. "leŭcit"-havaj vulkanaĵoj; en 1996 mi prelegis enkadre de la Kongresa Universitato pri la nordbohemia subakva vulkanismo – same mia originala malkovro; mi gvidis du kongresajn ekskursojn kun geologia-naturhistoria-arĥeologia-ekologia temo.

Samkiel en historia geologio, nova periodo startis en ISAE. Analoge al ekz. permio, nomita laŭ la urbo urala, ekregis pli varma "periodo eŝvegio", nomita laŭ la ĉarma kaj geologie interesa urbo en germana Heslando. Mi povis reaperi sur la paĝoj de Scienca Revuo. La fino bona, do ĉio bona!

**Adreso de la aŭtoro**

*RNDr. Josef* KAVKA *C.Sc.*
*Lužná 7 – Vokovice*
*CZ – 160 00 P r a h a 6 /* ĈEĤIO

**Priaŭtora informo**

La aŭtoro estas doktoro de natursciencoj, kandidato de teĥnikaj sciencoj, profesia geologo. Honora membro de ISAE. Honora membro de UEA.





## Planlingvaj samtempuloj: "Scienca Gazeto" kaj "*Schola et Vita*"

*Věra* BARANDOVSKÁ-FRANK

### Scienca Gazeto

Kiam en la jaro 1906 fondiĝis **Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)**, Esperanto jam 19 jarojn estis funkcianta internacia lingvo, en kiu aperadis movadaj revuoj ("La Esperantisto", "Lingvo Internacia", "Revuo Internacia", "Tra la mondo", "Oficiala Gazeto", "Internacia Pedagogia Revuo" k. a.). La oficiala organo de ISAE, "**Internacia Scienca Revuo**", startigis sian karieron 1904-1906 ĉe la prestiĝa eldonejo *Hachette* en Parizo, kaj 1907-1910 ĝi transiris en Ĝenevon, redaktata de neniu malpli grava ol *René de Saussure*. Ĝi aperis ankoraŭ en 1911 en *Kötzschenbroda*, 1912-1914 refoje ĉe *Hachette* (**ĉi-foje sub la nomo "Scienca Gazeto"**) kaj 1922-1923 en *Horrem*. Kvankam inter la kunlaborantoj estis famuloj kiel *Leon Zamenhof, Kazimierz Bein, Rollet de l'Isle, Eugen Wüster, Henri Valienne, Stanislav Kamarýt* k. a., **"tiu gazeto iom post iom pleniĝis je artikoloj de amatoroj, lingvaj diskutoj, reformaj polemikoj, fremdaj al la scienco"**, kiel diras *Stojan* (1973:314). ISAE ĉesis aperigi sian revuon kaj eldonis nur malgrandan bultenon. **Nur 1949 (re)aperis la ĝisnuna "Scienca Revuo"**.

Kio okazis dum la paŭzo?

En la jaro 1931, Amerika Esperanto-Instituto (556 *State Street Madison, Wisconsin*, Usono) decidis eldoni popularsciencan revuon en Esperanto. Ĝi transprenis la nomon de la iama pariza "Scienca Gazeto". La usona revuo sub la redakto de *Karl Froding* komencis aperi en 1932; ĝi estis dumonata, komence deksespaĝa, kun subtitolo "dumonata gazeto popularscienca pri diversaj temoj".